

## & Kion la vivo alportis:

< Rekante 38 el 77 batoj por strofo, entute 693 paŝoj dum 8 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof poemojn unuan (Bohema Revuo Esperantista, februare 1911) kun dediĉo "Al mia juna franca amiko, sinjoro J. Bordes en Saint Chamond" kaj moto "Aferojn kaj dezirojnĉiuj havas – mi ankaŭ, la mizera, iros fari aferon mian... (El "Hamleto".)" kaj duan (De Avondpost, s-Gravenhage, Nederlando, 1911 aprile 1-an) kun moto "Venos tempo, en kiu aro da bonaj homoj Vin ŝatos Komenio, eĉ farojn, eĉ esperojn Viajn, eĉ ankaŭ dezirojn. G. W. Leibnitz 1671". Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:77> (mimi mimi mire redo doLa; SoSo SoSo dodo rere rere; mimi mimi mire redo doLa; SoSo SoSo dodo rere La La; mimi mimi mire redo doLa; SoSo SoSo dodo redo La La; SoSo SoSo dodo doSo La La;

(#:Rekantaĵe: re re rere redo doLa; SoSo So Sodo re re; re re rere redo doLa; So So Sodo re re; mi mi mire redo doLa; SoSo do do redo La La; mi mi mire redo doLa; SoSo do do redo La La a)

)×9)+

### (&Strofoj:

#### ,& Sur nova vojo:

'1 Ĵus mi rememoras tiun tempon, ; kiam mi ekaŭdis antaŭ jaroj, ; ke en mondo ie iu homo ; lingvon ian novan publikigis, ; kaj ke tiu stranga idiomo ; alkondukos homojn trans la baroj, ; kiujn la miljaroj amasigis.

(×: **Vento blovas sur ĉielo ; portas freŝan aeron ; Vento de la verda stelo ; karesas la teron ( ; Granda kaj genia menso)×2 ( ; portis al ni novan penson.)×2 )**

'2 Senpripensa tiam mi rimarkis ; la aferon sole unu fojon, ; sed ne multe tion komprenante ; mi forpelis ĝin el la memoro, ; ne ankoraŭ tiam divenante, ; ke mi iam sekvos saman vojon ; kaj ke sangos por ĝi mia koro. ....

'3 Tiam ankaŭ mi apenaŭ sciuis, ; ke alvenos noktoj sen la dormo ; kaj la tagoj plenaj je la nubo, ; plenaj je doloro kaj sen fido, ; ke esperon sekvos ĉiam dubo ; kaj ĥimeroj de plej stranga formo ; ke min persekutos kun ekrido. ....

'4 Do mi ne bedaŭras tiun ŝanĝon. ; Iru nur aliaj sur la vojo ; glata, bela, simpla, oportuna ! ; Min allogas ĉiam nur la baro, ; kiu staras antaŭ mondo suna ; kaj sur tiu baro kun la ĝojo ; mi batalos gaje por idaro. ....

#### ,& J. A. Comenius:

'5 Ĉu Vi konas malgrandetan urbon, ; kiu ĉe Vi, ie en la Nordo ; kuŝas dolĉe ĉe la mara bordo? ; Naarden estas ĝia simpla nomo ; kaj en tombo tie sub la tero ; songas dolĉan songon sen sufero ; sanktaj restoj de l' plej bona homo. ....

'6 Se Vi konas urbon Vian; kaj Vi tien venos per okazo, ; mi, Sinjor', Vin petas kun emfazo, ; lin vizitu en libera horo. ; Por la samaj celoj idealaj, ; kiujn ni nun sekvas, plej kristalaj, ; batis ankaŭ lia bona koro. ....

'7 Kiel Vi kaj mi, li ankaŭ songis ; en la verkoj belaj sen komparo ; pri la unueco de l' homaro, ; pri eterna kaj senĉesa paco; sed al li kaj lia flama vorto ; malfavora estis viv' kaj sorto, ; - sur la tero mankis por li spaco. ....

'8 Sed li fine trovis la trankvilon ; kaj kun sia songo ĉarma, granda, ; en malgranda urbo nederlanda ; dormas tiu nia antaŭulo ; kaj sur lia tombo, jam sen larmo, ; kantas nune nur la birda svarmo ; kaj ekfloras simpla konvolvulo. ....

'9 Se Vi tien venos, mi Vin petas, ; diru al li, ke en lia lando ; estas nune viva propagando ; por la songo lia filozofa, ; ke en kor' de multa jam Bohemo ; gaje kreskas lia bona semo ; en la form' de lingvo Zamenofa. ....)